

ĈU ESPERANTO BEZONAS NOVAJN VORTOJN?

de d-ro V. HAPPACH kaj dipl. ing. R. HAFFERKORN

Esperanto bezonas novajn vortojn, nur, se estas tute neeble uzi proprajn Esperantovortojn. Pro tio la esperantista verkisto aŭ fakvortaristo uzu unue jenajn eblojn, se temas specialigi ĝeneralan nocion:

1. per adjektiva atribuaĵo (ekz-e kurenta konvertilo apud metalurgia konvertilo),
2. per kunmetaĵo kaj derivaĵo — formado de nova vorto el jam ekzistantaj elementoj [radikoj kaj afiksoj] (ekz-estacidomo, disaŭdigo, rulpremi),
3. per klarigaj frazoj, kiuj mencias la celon, la funkciadon, ktp.

La tria eblo plej ofte ne estas kontentiga, ĉar scienca aŭ teknika teksto postulas pli koncizan esprimmanieron.

Por povi esprimi sin per Esperanto unusignife rilate unuopajn nociojn, eĉ en Scienco kaj Tekniko, t.e. por eviti miskomprenojn, oni havas — krom la eblon difini aŭ klarigi la koncernan nocion aŭ la objekton per multe da vortoj — du principajn eblojn:

aŭ pliampleksigi la nocian enhavon de jam ekzistanta vortradiko, aŭ krei neologismon.

La lasta eblo sendube estas la pli komforta; ĝi havas krom tio la avantaĝon, krei unusignifajn — kvankam ne ĉiam ĝenerale kompreneblajn — nociojn; tamen: ili tro ŝargas la vorttrezoron, sen esence pliriĉigi ĝin.

La unua menciita eblo estas la sendispute pli malfacila; ĝi alportas samtempe la danĝeron, ke pro la plursignifo (homonimeco) de la vortoj estas eblaj miskomprenoj, almenaŭ neklaraĵoj.

El tio rezultas jeno: necesas kompromiso, kiu en la plej favora maniero kunigas la du postulojn starantajn opozicie unu kontraŭ la alia:

- a. ne-miskomprenobleco,
- b. evito de *superflua*j neologismoj.

La malfacilaĵo kuŝas en la nocioj „superflua” kaj „plej favora”, ĉar la prijuĝado de ĉi tiuj proprecoj restas ĉiam *subjektiva* afero.

Almenaŭ estas necese detale motivi ĉiun proponon por neologismo kaj samtempe diskuti ĉiam la motivojn, kiuj kontraŭstaras la uzadon de aliaj, jam ekzistantaj vortoj de simila nokia enhavo.

Dum *vortoj de kutima, simpla interparolado* enhavas plej ofte nur ĝeneralan nocion, kiu specialiĝas — kiel ni ĉi-supre menciis — per adjektivaj aŭ substantivaj atribuaĵoj aŭ per klarigaj frazoj; *terminoj* enhavas krom iun ĝeneralan nocion ankaŭ unu aŭ plurajn specialajn nociojn, ekz-e:

vidi = tute ĝenerale „vidi”, t.e. percepti per okuloj,

rigardi = atente vidi al iu objekto, ofte helpe de optikaj iloj (lupeo ktp.),

vizuri = rigardi celpunkton per ilo post kiam oni direktis la ilon al tiu celo,

pejli = vizuri celon per angulmezura instrumento por fiksi la pozicion de punkto aŭ rekto rilate al konata punkto aŭ direkto pere de angulmezurado.

La ĉi-supra ekzemplo montras, kiom da vortoj ŝparas la uzo de „terminoj”. Tamen ni zorgeme atentu la ĉi-supre donitajn direktivojn por la kreado de neologismoj.

Kritika rimarkigo de Prof. G. Waringhien: Mi konsentas kun la konkludo, ke en preskaŭ ĉiuj okazoj, temas pri relativa juĝado inter du tendencoj aŭ postuloj: krei absolutajn regulojn estas neeble en tia tereno. Sed mi emas aldoni tiun rimarkon, ke tro ofte la teknikistoj, precipe se ili scias nur unu lingvon, tendencas multigi la teknikajn neologismojn, dum la komparado inter pluraj naciaj lingvoj ofte montras ke tiu aŭ alia teknika vorto povas senĝene aŭ esti esprimata per ordinara radiko, aŭ ricevi pli taŭgan formon. Ekz-e la ekzemploj, kiuj estas donitaj fine de la artikolo estas bone elektitaj, sed malbone formitaj: mi ne scias, de kiu lingvo s-ro H a p p a c h eltiris „*vizuri*”, kiu vorto, laŭ mia scio, estas barbarismo en naciaj lingvoj; kaj „*pejli*” estas necesa germanismo. Se oni volas elekti radikon por la ideo „rigardi celpunkton ktp.”, la sola solvo estas tiri el la franca la radikon „*vizoro*”, kiu difinas la „ilon por rigardi celpunkton”, kaj de tiu oni tute regule kaj senbarbarisme derivas „*vizori*” por la nomata ago. Pri la lasta difino, la franca ankaŭ liveras oportunan solvon: ni diras simple „*goniometrer*”; kial do ne same diri „*goniometri*”, uzante la jam ekzistantan radikon teknikan? Kaj vi tuj trovos ankaŭ la komunlingvan ekvivalenton (*goniometri* = *angul/mezur/i*).

Oni neniam devas forgesi, en la teknika lingvo, ke ekzistas jam grandskala internacia vorttrezoro en la naciaj lingvoj, kaj ke enkonduki neologismon tiritan el unu sola lingvo (kiel „*pejli*”) donas helpon al neniuj laŭ, kiu devas serĉi pene, al kiu internacia nocio tiu vorto respondas.